Arabella Katherine Hankey,

# Diru la historion pri Kristo nun al mi

*tradukita de Agnes B. Deans*

Diru la historion pri Kristo nun al mi;
Rakontu plene ĉion pri lia am' por ni.
Kvazaŭ al juninfano rakontu simple ĝin—
Anima la malsano jam ellacigis min.
Karan la historion, karan la historion,
Karan la historion rakontu nun al mi.

Klare kaj malrapide vi komprenigu min
Pri Dia elaĉeto por senpekigi nin,
Por ke la scio bena restadu en memor':
La roso frumatena tagmeze pasas for.
Karan la historion, karan la historion,
Karan la historion rakontu nun al mi.

Pri la Animsavinto solene diru vi;
Mi estas la pekinto por kiu mortis li.
Ĉiam pri li parolu kun amo kaj fervor',
Kaj tiel min konsolu, se premas min dolor'.
Karan la historion, karan la historion,
Karan la historion rakontu nun al mi.

Diru la saman veron, se iam timos vi,
Ke vantan mondprosperon tro kare gajnas mi.
Kiam, en la horo, Jordano frontos min,
Mi aŭdu en la gloro: "Jesuo savas vin".
Karan la historion, karan la historion,
Karan la historion rakontu nun.

*Traduko de la Angla poemo "Tell me the old, old story" de* Arabella Katherine Hankey *(*1834 – †1911) en Esperanton de Agnes B. Deans.*

*Arg-1026-2081 (2014-05-28 09:28:28)*

Arabella Katherine Hankey,

# Tell me the old, old story

Tell me the old, old story of unseen things above,
Of Jesus and His glory, of Jesus and His love.
Tell me the story simply, as to a little child,
For I am weak and weary, and helpless and defiled.
Tell me the old, old story, tell me the old, old story,
Tell me the old, old story, of Jesus and His love.

Tell me the story slowly, that I may take it in,
That wonderful redemption, God's remedy for sin.
Tell me the story often, for I forget so soon;
The early dew of morning has passed away at noon.
Tell me the old, old story, tell me the old, old story,
Tell me the old, old story, of Jesus and His love.

Tell me the story softly, with earnest tones and grave;
Remember I'm the sinner whom Jesus came to save.
Tell me the story always, if you would really be,
In any time of trouble, a comforter to me.
Tell me the old, old story, tell me the old, old story,
Tell me the old, old story, of Jesus and His love.

Tell me the same old story when you have cause to fear
That this world's empty glory is costing me too dear.
Yes, and when that world's glory is dawning on my soul,
Tell me the old, old story: "Christ Jesus makes thee whole."
Tell me the old, old story, tell me the old, old story,
Tell me the old, old story, of Jesus and His love.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* Arabella Katherine Hankey *(*1834 – †1911).*

*Arg-1026-2080 (2014-05-28 09:48:31)*

*Pri la verkintino vidu la retejon* `http://cyberhymnal.org/bio/h/a/n/hankey_ak.htm`*. La melodio estas verkita de William H. DOANE, en 1870. Legu ankaŭ:* `http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/d/dirulahis1.html`*.*